

**ELDONANTOJ:**  
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gili Norton, Barcelona  
Teo Jung, Köln (Kolonia)  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)  
**REDAKTOROJ:**  
Ĉef-redaktoro: Teo Jung  
Kun-redaktoro: M. Butin.  
Fletofono red.: Zanoŝi.  
**ADMINISTREJO:**  
Horrem bei Köln, Germ.  
Poŝtekkonto Köln 70865,  
por Teo Jung, Horrem.  
**ANONCOJ**  
el ĉiuj landoj 4 germ. mk.,  
po cm<sup>2</sup>, ĉe grandaj aŭ  
ripetataj anoncoj rabato.

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

### Interacia SEMAJNA Neŭtrala

**Kolektu anoncojn por ET!!**  
Al kolektintoj de anoncoj  
(ne anoncoj) ni konsentas  
rekompencon de 25<sup>o</sup> u.

**Abono** ĉiu pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, aŭ per ĉeko, sed ne per poŝtmandato. — **Por adresoŝanĝoj** ni kalkulas la prezon de 3 numeroj, por kiom valoras la pago. — **Prezo de unu numero:** 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 ŝved. kr., 0.50 avis. fl., 0.50 dana aŭ norvega kr., 0.50 peseto, 3 1/2 pencoj, 0.50 fr. aŭ belg. fl., 0.70 liro, 1.20 fmk., 1.40 ĉ. kr., 5 germ. mk. (ankaŭ por ballaj kaj balkanaj ŝtatoj); por rusoj 1 germ. mk., 8.- hung. kr., 35 pol. mk., 35 aŭstr. kr.; internacie respond. kuponano. — Liston de niaj Abonejoj en diversaj landoj vidu sur paĝo 4! — Germanoj ĝuas altan profiton, se ili abonas ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 13. Nachtrag, Ergänzungsheft n-o 3, paĝo 280, sub „Kunstsprachene“).

**Numero 82 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 30. Aprilo 1922.**

## Internacia Konferenco en Genève

### pri Instruado de Esperanto en Lernejo.

**Bonvena Parolado de Sir Eric Drummond, Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj.**  
(Parla Mardon, la 18. Aprilo, en la Palaco de Ligo de Nacioj.)


**Estimataj gesinjoroj!**  
Mi ne bezonas diri, kiom grandan plezuron mi havas dezirante al vi koran bonvenon en la Sekretariejo de la Ligo de Nacioj. Ni ĝojas meti al la dispono de via konferenco la faciligon, kiun ni povas proponi al vi.  
Vi venis kiel delegitoj de multaj registaroj kaj de multaj grandaj institucioj urbaj kaj lernejoj por partopreni konferencon pri la instruado de Esperanto. Kiaj povas esti la opinioj pri la valoro de Esperanto kiel oficiala helpilingvo, ĉiu konsentos, ke la spirito, kiu inspiris la kunvokon de tiu konferenco, estas simila al tiu, kiu instigas la Ligon de Nacioj. Ni ĉiuj klopodas en diversaj kampoj por pli bona interkompreno kaj pli proksima kunlaborado inter la popoloj de la mondo. Estas granda idealo. Al ĝi homoj de bonvolo ĉiam donis kaj donos sindonan helpon.

Konsiderante tiun komunan celon, mi estas ĝoja, ke ni povas aranĝi, ke tiu konferenco okazu en la domo de la Ligo de Nacioj.

Sed ekzistas ankaŭ alia kaŭzo, kial la Sekretario havas specialan intereson pri via laboro. Lastan septembron, la dua kunsido de la Ligo de Nacioj decidis meti la demandon pri tutmonda instruado de Esperanto en lernejoj sur la programon de la tria kunsido okazonta la venontan aŭtunon. Estis ankaŭ decidiĉe, ke la Sekretario preparu dume plenan raporton pri la spertoj jam faritaj kaj rezultataj atingitaj.

Por tiu celo la Kunsido deziris faktaron kaj statistikojn, kaj tial ni dissendis demandaron, al kiu jam kelkaj el vi afable respondis. Mi esprimas nian sinceran dankon pro tiuj respondoj kaj la esperon, ke pliaj baldaŭ venos, ĉar ni kompreneble deziras, ke la Kunsido havu antaŭ si la tutan eblan informaron.

Mi estas certa, ke tiu konferenco metos plian lumon sur la problemon, kiun ni studas, kaj



Palaco de la Ligo de Nacioj, kie okazis la Laborkunsidoj de la Konferenco.

havigos al ni novan konon pri la diversaj eksperimentoj entreprenitaj de vi. Tuta tiu materialo estos tre valora por ni por plenumi nian taskon.  
Sed aparte de tiu speciala vidpunkto, la suba ĝigilo de komuna idealo instigas min, kiel Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj esprimi al vi, estimataj gesinjoroj, mian sinceran bondeziron por la sukceso de via konferenco.

### La Oficialan Programon de la Konferenco vidu en ET n-o 80.

### Oficiala Delegitara Listo.

**Aŭstra Delegitaro.**  
Hugo Haan, teknika konsilisto, del. de Ministerio por Publika Instruado.  
Prof. Schamaneĥ, direktoro de publika lernejo, lektoro pri Esperanto en la Teknika Instituto, Wten.

**Belga Delegitaro.**  
H. Haine, prof. en Bruxelles, del. de Belga Ligo Esperantista.  
Jacobs, instr. en Antwerpen, sekr. de Internacia Asocio Instruista.

**Por Bulgario.**  
N. F. Nicolaief, sekretaria konsilanto de la Bulgara Delegacio al la Ligo de Nacioj.

**Brita Delegitaro.**  
D-rino Alexandra Fisher, M. A., D. Lit., Bishop Auckland, direktorino kaj delegitino de Girl's County Council School.  
George Probert, Bedworth, instr. delegita de Eduka Kom.  
R. J. Wilcox, Bedworth, instr. delegita de Eduka Komitato.  
Miss Agnes Hogg, Glastonbury, instruistino delegita de Eduka Komitato.

**Brita Esperanto-Asocio.**  
J. Merchant, Sheffield, vicprez. de Brita Esp. As.  
W. M. Page, S. S. C., Edinburgh, vicprez. de Brita Esp. As.  
Montagne C. Butler, London, sekr. de B. E. A.  
Miss Jane Baird, Edinburgh, instruistino.  
Miss Elizabeth Hogg, Glastonbury, instruistino.

**Lankashire kaj Cheshire Federacio.**  
Profesoro W. E. Collinson, M. A., Ph. D., Liverpoola Universitato.  
Miss A. E. Dixon, Eccles, instruistino.  
Miss M. A. Caldwell, Leigh, instruistino.

**Yorkshira Federacio.**  
T. Holmes, Shipley, prez. de la Federacio.  
Miss Louise Briggs, Leeds, instruistino.

**Midlanda Federacio.**  
Mrs. K. Woodhouse, Birmingham, instruistino.

**Skota Federacio.**  
David J. Young, M. A., delegito de la Eduka Instituto de Skotlando.  
Miss Isa Watson, Coatbridge, instruistino.

**Skolta Delegitaro (Boy Scouts' Associations).**  
Kenneth Graham Thomson, Bexley Heath, delegito de Skolta Esperanta Ligo kaj de „The Trail“.  
Drummond Page, Edinburgh, Skola Agento de Skolta Esperanta Ligo.  
Miss Sarah Mc. Cullough, instruistino, Belfast, delegitino de Belfasta Skolta Asocio.

**Neoficiala instruista Delegitaro.**  
Miss E. Arnold, Belfast, instruistino.  
Miss L. E. Duncan, Manchester, instruistino.  
Miss E. Foster, Belfast, instruistino.  
Miss M. W. Hunter, Edinburgh, instruistino.

**Helpa Delegitaro.**  
Mrs. Holmes, Shipley.  
G. W. Goodall, London.  
Mrs. Goodall, London.  
John Willis, Sheffield.  
D. E. Stamp, Sheffield.

### La pantofloj.

Kara s-o redaktoro!

Ĉu vi havas edzinon? Ne? Danku al Dio, sinjoro, ĉar mi havas! Sed eble vi havas fianĉinon, kaj vi amas ŝin tute, ĉi havas ĉiujn bonajn kvalitojn por feliĉiĝi viron, ŝi estas anĝelo kun homa korpo, jam nuntempe ŝi estas tre zorgema pro via bonfarto, ĉiujn viajn dezirojn ŝi jam antaŭe elegas el viaj okuloj kaj ŝi...? Sufiĉas, sinjoro, sufiĉas! Mi ja scias, ke ĉiuj fianĉinoj havas tiajn bonajn kaj belajn kvalitojn, ke ĉiuj estas anĝeloj! Ĉu iam feliĉa fianĉo al vi rakontis ion alian pri sia amatino? Se ankaŭ vi estas en tia stato, se via fianĉino estas tre zorgema pro via bonfarto kaj plenumas viajn dezirojn jam antaŭe, ho, sinjoro, tiuokaze mi antaŭsentas malfeliĉon! Kara samideano, kara samtempulo, kara kunhomo, diru almenaŭ, ke mi eraras en unu sola rilato por min trankviligi: certigu al mi, ke vi ne ŝatas pantoflojn, ke vi neniam tiajn surmetas! „Pantofloj? Siranga demando!“ vi murmos. „Certe mi havas pantoflojn, vi povas ilin vidi ĉe mi, matene, kiam mi levigas kaj vespere, kiam mi sidas ĝoje fumante en mia balanca seĝo. Kaj kiel fama poeto povis verki siajn belegajn versojn nur havante putrajn pomojn en sia tirkestro, tiel min alflugas belaj pensoj kaj ideoj nur kiam mi havas miajn karajn pantoflojn sur la piedoj. Mia fianĉino ilin donacis al mi je Kristnasko kaj brodis sur ili la dolĉajn vortojn: „Pro amo.“ Ĉesu, sinjoro, ĉesu, apopleksio trafos min. Permesu, ke mi sidigu kaj pripensu la malfeliĉon en mia malĝoja animo. Mi ne povas, mi ne volas ekkompreni tion: Vi havas fianĉinon, kiun vi amas, kiun edzinigi vi intencas; kiu estas zorgema pro via bonfarto, kaj vi... ho, terura penso... vi ŝatas pantoflojn! — „Sed kion

signifas pantofloj rilate al la amo?“ vi kolere ekrius. — Multon, sinjoro, tre, tre multon; mi petas, mi petegas vin, ne kuregu kun malfermitaj okuloj en la malfeliĉon! En la profundo de mia koro mi sentas min devigata averti kaj eble ankoraŭ savi vin. Ĉu vi ne scias, ke la zorgemeco de la virinoj, sentata de ni komence kun ĝojo, poste kun indiferenteco, iom post iom povas iĝi al ni ekstreme maloporduna kaj fatala, precipe „rilate al la pantofloj?“ Vi ĉagrenigos, kolereigos, suferegos, kaj en sendormaj noktoj vi malbenos la iam tiom ŝatatan zorgemcon de via kara edzino. Aŭskultu do la plorindan sorton de malfeliĉulo kaj savu, kio ankoraŭ estas savebla!

Ankaŭ mi estis iam sen-ina. Tiam mi loĝis ĉe familio kun kelkaj infanoj. Bedaŭrinde mi havis kaŭzon plendi pri multo; speciale rilate al miaj pantofloj malica koboldo ŝajnis ema koleregi min. Kiel vi, mi ŝatis kaj nepre bezonis ilin por mia komforto. Sed enirinte mian ĉambron post laciga taglaboro, mi neniam ilin trovis; unufoje ili estis en la ŝranko anstataŭ sub la lito, aliffoje unu troviĝis sur la ŝranko kaj la alia sub la sofo, unufoje mia mastrino ilin estis surmetinta, ĉar la ŝiaj estis ĉe la ŝuisto, aliffoje la infanoj — por min ĉagreni — estis ilin kaŝintaj en mia lito aŭ uzintaj ilin dum la ludo kiel veturilon. Mi insultis, mi admonis, mi petegis, mi blasfemis — senutila farado! Tiam mi konatiĝis kun mia fianĉino. Ŝi estis korkara estaĵo, ankaŭ „anĝelo“. Kio do estis pli komprenebla ol tio, ke mi plendis al ŝi pri mia pantofla ĉagreno? Ŝi konsolis min per amaj vortoj, ŝi ploris pro mia malfeliĉo, korusiĝis ĉe miaj piedoj, ŝi neniam plu mi havas kaŭzon plendi pri malkomforto kaj, ke ŝi speciale zorgos pri miaj pantofloj. Ni geedziĝis kaj vivis ĝoje ĝeĝe en la unua tempo. Sed iom post iom forflugis la idealoj; mi sopiris al rekunestado kun miaj

amikoj, kiujn mi tute estis forgesinta. Nu, ĉi tiuj kunsidoj daŭras ofte pli longe, ol mi intencis, kaj timeme mi ŝtelras hejmen, kie amata edzino atendas min. Kaj ŝi, ŝi nun tre ekzakte plenumas sian promeson pri mia komforto „speciale pri miaj pantofloj“; ĉar neniam mi bezonas ilin serĉi. Aŭskultu, sinjoro, apenaŭ mi estas malfermita la pordon de nia dormejo... Jen siblante alflugas mian kapon unu el miaj pantofloj akompanata per la dolĉaj vortoj: „Vi malbonulo, vi vagulo“, kaj tuj sekvas la alia frakasanta mian nazon, kaj aŭdiĝas la karesaj vortoj: „Vi drinkemulo, vi devonforGESANTA abomenulo“ kaj aliaj flataĵoj. Kaj fine ŝiaj propraj pantofletoj efektive fruezan dancon sur mia dorso, ĝis mi savas mian kompatindan korpon sub la kovrajn de mia kuŝejo, kie mi verŝas la plej maldolĉajn larmojn. Fakte, sinjoro, neniam mi bezonas serĉi miajn pantoflojn!

Se eĉ nun vi havas la kuraĝon edziĝi kun fianĉino ama brodi al vi pantoflojn, memoru pri la plorinda sorto de

via malfeliĉa  
*Kristiano Mallera.*

### En la montojn!

De D-ro Joh. Ev. Schweiker.

La librotenisto G. estis tagmanĝinta kaj iris kun kontenta mieno al la fenestro de sia beleta loĝejo. Sovinte ambaŭ manojn en la pantalonpoŝojn li rigardadis la antaŭn li kuŝantajn Alpoj. „Ĉu vi vidas, Anjo, ke la montoj plibluigas de tago al tago?“ Ho, kiom mi deziregas mian Pentekostan forpermeson! Ĝin mi volus tiuĉjare pasigi en la montoj.

„Kaj mi kune kun vi!“ respondis ĝoje lia edzino, kiu jus estis puriganta la mangotablon.

„Kompreneble!“ ridis G., sin turnante al ŝi kun amoplena rigardo.

„Paĉjo, kaj ankaŭ mi!“ petegis Hanĉjo, la fileto, kiu sidis ĉe siaj lernlibroj.

„Ankaŭ ci, Hanĉjo, certe! Sed nur, se ci ne plu estos punata de cia instruisto pro mallaboremo.“

„Ne, ne, paĉjo, mi estos tre diligenta kaj kondutos bone!“

La knabo ekstartis kaj saltetis tra la ĉambro ĝojegante.

Ankoraŭ ofte rigardadis G. tra la fenestro de sia loĝejo la ĉarmajn montojn kaj li ŝajnis pli kaj pli belaj al li. Lia dezirego kreskadis kaj apenaŭ li povis atendi la komenciĝon de sia forpermeso.

Fine Pentekosto estis alveninta.

„Do, sinjoro G., pasigu nun kun multe da plezuro vian merititan forpermeson! La forta kaj bonodora montaero estos tre utila al via malsaneta pulmo.“

„Mi tre dankas al vi sinjoro direktoro!“ diris riverencante la librotenisto. Poste li rapidis el sia oficejo hejmen. Survoje lin atakis refoje la malbenita tuso. Ĝi ne pliboniĝis. Sed eble la pura montaero bone efektos, kiel la direktoro esperis.

La librotenisto forveturis per rapidvagonaro, de neniu akompanata, ĉar lia edzino kaj Hanĉjo subite estis forvojaĝinta al parencoj por heredaferoj.

Estis belega mateno. En la kupeo G. trovis gajegan vojaĝkunularon: ankaŭ forpermesulojn, ankaŭ montramponojn. Ili rakontadis al si ĉi-proke spiritojn, unu pli amuzan ol la alian. La librotenisto ridadis kore. Sed la ridado ekaltis la tuson. Subite G. fariĝis silenta kaj liaj vizaĝtrajtoj montris grandan lacecon. Unu el la kunvojaĝantoj demandis lin, ĉu li eble estas malsana. „Ha ne!“ li respondis.



### Cehoslovaka Deleĝitaro.

Prof. D-ro Rudolf Fridrich, delegito de Ministerio de Publika Instruado.  
Prof. D-ro Kamaryt, del. de Ministerio Pedagogia Instituto „Komensky“ kaj de Cehoslovaka Esp. Asocio.  
B. Ludvik, instruisto, del. de UEA en Kostelec.  
F-ino J. Supichová, instruistino, delegitino de Esperantista Virina Rondo en Praha.  
Karl Hell, inspektoro, delegito de Ligo de Esp. Societaro Germana en Cehoslovakio.

### Ĉina Deleĝitaro.

D-ro Tch'ou-wei, teknika konsilanto de la Ĉina Delegacio al la Ligo de Nacioj.  
Sinpak, del. de UEA en Pekingo.  
Kenn, del. de Esperantista Studenta Rondo en Franco-Ĉina Instituto.

### Dana Deleĝitaro.

Prof. N. C. Carlson, direktoro de la komerca lernejo en Odense, del. de Centra Dana Esp. Ligo.  
F-ino Asta Mikkelsen, instruistino en Kopenhago, prezidantino de Dana Esperantista Instruistaro.  
F-ino Astrid Rybo, sub-inspektoro lerneja en Kopenhago, delegitino de Centra Dana Esp. Ligo.

### Por Egipto.

Mohamed Fahmy, prezidanto de la Egipta Junularo.

### Por Finnlando.

Tapio Voionmaa, del. de Ministerio de Publika Instruado.

### Franca Deleĝitaro.

Pascalis, eks-prezidanto de la Komerca Ĉambro en Paris, del. de Komerca Ĉambro en Paris.  
André Baudet, prez. de la Administra Komitato de Komerca Lernejo en Paris, del. de Komerca Ĉambro en Paris.  
Deligny, profesoro en la liceo de St-Omer, delegito de Komerca Ĉambro de St-Omer, de Societo de l'Amikoj de Esperanto kaj de Franca Societo por Propagando de Esperanto.  
L. Poncelet, delegito de la Franca Societo kaj de la Grupo Esperantista en Lyon.  
F-ino Henriette Meyer, instruistino en Paris, delegitino de Societo de l'Amikoj de Esperanto.  
Testud, instruisto en Firminy, del. de UEA.  
Ratouillat, instruisto en St. Nicolas, del. de UEA.

### Por Georgio.

Chavi-Chvili, reprezentanto de la Delegacio de Georgio al la Ligo de Nacioj.

### Germana Deleĝitaro.

Prof. D-ro Dietherle, direktoro de Esperanto-Instituto por Germana Respubliko sub Ministerio de Interno, kaj delegito de Brunsviga Ministerio de Publika Instruado.  
D-ro Steche, Leipzig, prezidanto de Germana Esp. Asocio, eks-deputito de Saksa Parlamento, del. de Saksa Ministerio por Ekonomio.  
D-ro Trögel, profesoro en la seminaro de Auerbach, del. de Saksa Esperantista-Ligo.  
Prof. D-ro Ledermann, Nürnberg, prezidanto de Bavara Ligo Esperantista.  
Hahn, instruisto en Dresden, del. de Saksa Popola Instruistaro.  
Kurt Kauffmann, del. de UEA, Heidelberg.

### Por Hungario.

Prof. Zoltan Baranyai, direktoro de la hungara sekretariaro ĉe la Ligo de Nacioj.

### Itala Deleĝitaro.

Prof. Kom. Alessio, Padova, del. de Mara Ministerio.  
D-ro A. Filipetti, sindiko de Milano.

Kavaliro Attilio Vaona, Verona, prez. de Itala Federacio Esperantista.

Ippolito Piatti, instruisto, del. de Milana Publika Instruado.

Pietro Rota, instruisto, del. de Milana Publika Instruado.

F-ino Domenica Pomarici, instruistino, delegitino de Instituto de Esperanto por Lombardio.

D-ro Toschi, profesoro en teknika lernejo, del. de Cologna-Veneta Publika Instruado.

### Japana Deleĝitaro.

Usami, sekretario konsilanto de la Japana Delegacio al la Ligo de Nacioj, del. de Japana Esp. Instituto per komisio de Ministerio por Eksterlando.

Kavanishi, teknika konsilanto de la Japana Delegacio ĉe la Internacia Labora Oficejo, helpa delegito de Japana Esp. Instituto.

S-ino Alphonse, instruistino, delegitino de Departamento de Publika Instruado.

F-ino N. Dubois, instruistino, delegitino de Departamento de Publika Instruado.

Rudhard, instruisto, del. de Dep. de Publ. Instruado.

Martin, instruisto, del. de Dep. de Publ. Instruado.

### Neuchâtel.

G. Stroele, instruisto en Neuchâtel, delegito de Departamento de Publika Instruado.

Ed. Ducommun, instruisto en Le Locle, delegito de Departamento de Publika Instruado.

William Perrenoud, instruisto en Cernier, del. de Svisa Esp. Asocio.

F-ino Straub, instruistino en Neuchâtel, delegitino de Svisa Esp. Asocio.

### Bern.

Ed. Stettler, prezidanto de UEA.



Kunsido de la Konferencanoj.

### Nederlanda Deleĝitaro.

Prof. J. V. Sevenhuijsen, Haarlem, del. de Ministerio por Publika Instruado, prez. de Internacia Asocio Instruista.  
Bramkamp, instruisto en Hago, del. de Nederlanda Esp. Ligo.

### Por Rumanio.

Abato Andreo Cze, profesoro en Cluj, delegito de Transilvania Esp. Societo.

### Por Ruslando.

S-ino N. Umanski, delegitino de Esp. Societo en Moskvo.

### Por Svedlando.

Elias Beckmann, profesoro en Gävle, delegito de Sveda Esperantista Federacio.

### Svisa Deleĝitaro.

Genève.  
D-ro Pierre Bovet, profesoro en la Universitato, direktoro de Instituto J. J. Rousseau, delegito de Departamento de Publika Instruado.

D-ro Edmond Privat, docento en la Universitato, del. de Departamento de Publika Instruado, prez. de Internacia Komisiono por Esperanto en Lernejo.

Zürich.  
Unger, sekretario de Svisa Asocio por Internacia Komerca Lingvo.

### Por Ukrainio.

S-ino Alexandra Mexlin, delegitino de UEA kaj de Ukraina-Svisa Komerca Ĉambro.

## Organizoj oficiale reprezentitaj:

Ligo de Nacioj.  
Internacia Labor-Oficejo.  
Internacia Komitato de Ruĝa Kruco.  
Ligo de l' Societoj de Ruĝa Kruco.  
Internacia Pac-Oficejo.  
Internacia Unuiĝo de Helpe al Infanoj.  
Universala Alianco de la Kristanaj Unuiĝoj Ĝenerularaj.  
Internacia Oficejo por la Defendo de Indigenoj.  
Internacia Oficejo por la Rajtoj de l' Popoloj.  
Internacia Bahaista Movado.  
Internacia Virina Ligo por Paco kaj Libereco.  
Mond-Unuiĝo de Virinoj.  
Ligo de Judaj Virinoj.

arangas veran regalon: Nun mi trinkas, trink-manĝas kaj manĝtrinkas kvin — ses — eĉ sep glasojn da ĉajo diverskolorajn, mi sattrinkas preskaŭ ĝis krevono, mia ventro komencas ŝveli, kiel ĉe la nomitaj bankistoj, kaj mi rigardas komplate aliain malfeliĉulojn, kiuj ĉiutage pli maldikiĝas — sed jen! Mi nun malavare publikigas mian sekreton, kiel vera filantropo — do, ĉiuj havas rajton bone vivi!

Kapa.

## Diversaĵoj.

### Moderna sorĉisto.

D-ro Moineau estas homo, kiu kreis novan sciencan: la sciencan eltrovi akvofontojn. Oni scias, ke jam de tre longe sorĉistoj nomataj „fontistoj“ eltrovis subteran akvon per magnetizaj vergetoj de avelujo. Nu, d-ro Moineau sciencaj studis tiujn ĝis nun empiriajn agmanierojn; la jena rakonto montros, kiagrade li sukcesis.

La urbo Toulon en Franclando serĉis lokon, kie elĉerpi akvon por provizi sin, kaj kompreneble deziris trovi la plej proksiman subteran fonton, por ke la elspezoj de alkonduko estu plej eble malaltaj.

Ii unue turnis sin al la sorĉistoj-fontistoj sen kontenta rezultato, poste al d-ro Moineau. Per skatolo, kies dimensioj similas tiujn de fotografilo, kaj kiun li vice celdirektis al la kvar horizontaj flankoj, li eltrovis subteran riveron, antaŭindikis ĝian direkton, ĝian larĝecon, ĝian debiton kaj la profundecon, je kiu oni trovas ĝin. Plie li sciigis, ke tiuloke la akvo entenis du bacillojn: la „paratifan A“ kaj la „disenterian“.

Suprenirante laŭ la fluo de la subtera rivero, oni trovis sterkosojn, kiu verŝajne kaŭzis la malpurigon de la akvo. Efektive, daŭrigante d-ro

Sociala Lernejo por Virinoj.  
Ligo de Morala Agado.  
Franca Komerca Ĉambro en Genève.  
Itala Komerca Ĉambro.  
Nederlanda Komerca Ĉambro.  
Hispana Komerca Ĉambro.  
Ukraina-Svisa Komerca Ĉambro.  
Svisa Turisma Oficejo.  
Direkcio de la Fervojoj Federitaj.  
Eŭropa Konferenco de Horaroj.

## La Paskaj Tagoj.

Alveno. — Teo. — Diservo. — Akcepto ĉe Virina Ligo. — Ekskurso persipa. — Akcepto ĉe Domo de Etuloj de Instituto J. J. Rousseau. — Parolado de Prof. D-ro Pierre Bovet. — Respondo de D-ro Edm. Privat.

Ĉi tiu konferenco, unika kiel la unua internacia kongreso de edukistoj ĝis nun okazinta, aliris al Genevo imponantan aron da instruistoj de Esperanto el diversaj partoj de la mondo.

Por la akcepto de la konferencanoj estis tre oportunaj aranĝoj laŭ la direkto de D-ro Edmond Privat kaj loka komitato. Akcepto starigis en la enirejo al bela manĝosalono de la hotelo Richmond, kie deĵoris f-ino Dubois. En tiu hotelo la plimulto el la konferencanoj loĝas aŭ manĝas kaj ĝuas bonan oportunon por interdiskutado.

Dimanĉon, la 16-an de aprilo, matene alvenis la britaj delegitoj. Ili formis la pli grandan nacian eron de la konferenco kun 29 membroj el 89 en la oficiala delegitara listo. Tiu listo montras, ke po 1 delegito enskribiĝis el Bulgarujo, Egiptujo, Finnlando, Georgio, Hungarujo, Rumanujo, Ruslando, Svedlando kaj Ukrainujo, po 2 el Aŭstrio, Belgujo, Japanujo kaj Nederlando, po 3 el Finujo, kaj Danujo, 5 el Cehoslovakio, 6 el Germanujo, po 7 el Francujo kaj Italujo, 12 el Svislando kaj 29 el Britujo.

Dimanĉon posttagmeze gastigis la jam alvenintajn konferencanojn la Geneva grupo „Stelo“ en la ĉarma parko Grange. Bedaŭrinde pro la pluvo la festeno ne estis tiel sukcesplena kiel oni esperis; sed sub bela kolonado 70 Esperantistoj gaje interkonatiĝis kaj interbabiladis kaj trinkis teon. Poste oni vizitis la ekspozicion en la Instituto J. J. Rousseau, kie oni montris lernolibrojn, fotografiojn de junaj Esperantistoj en siaj kursoj, geniajn instruilojn de s-o Sevenhuysen el Haarlem kaj originalan laboron de lernantoj. Diservo okazis je 6 h. vespere en la kapelo de la Makabeoj ĉe la Katedralo. Pastro Christen, ĉef-pastro de la Katedralo, bonvenigis la adorantojn, kaj dum la diservo oni kantis himnojn el la „Himnaro Esperanta“ eldonita de B. E. A., kiujn s-o M. C. Butler, London, akompanis sur la orgeno. S-o W. M. Page el Edinburgo predikis laŭ la teksto „Aŭtomate (post servado) la tero produktas frukton, unue folion, poste spikon, poste planan grenon en spiko“ (Marko IV). S-o Rudolf Höpfer el Genevo legis el Nova Testamento.

En la vespero tre agrable akcepto okazis ĉe la Virina Ligo por Paco kaj Libereco. Fino Bolsch, sekretario, alparolis la gastojn Esperante kaj angle pri la celoj de la Ligo kaj afable bonvenigis la vizitantojn. D-ro Dietherle respondis Esperante kaj s-o Page angle kaj dankis.

Je lundo matene jam alvenis la plimulto de la konferencanoj. Oni sekvis la modernan pedagogian metodon: Unue ludi, poste studi. La ĉefa parto de la tago estis dediĉita al ekskurso sur la bela lago de Lemano. Bedaŭrinde, pro la daŭra pluvo oni ne povis vidi la ĉirkaŭaĵojn de la lago laŭ plej bonaj aŭspicioj, sed rekompence la Esperantistoj estis preskaŭ la solaj personoj en la salono, kaj bona okazo prezentis sin por interparolado prepara por la ĉefaj kunvenoj de la konferenco. En tiuj rondoj instruistoj klarigis siajn metodojn, ludojn ktp., per kiuj oni lernigas Esperanton. La kompanio alvenis en Ouchy-Lausanne

La vagonaro haltis. „Partenkirhen! Ĉiuj volu eliri!“ ekkris la kondukto. La kunvojaĝantoj deziris al la librotenis bonan resanigon kaj multe da plezuro. Tiu ĉi forlasis lasta la kupeon. Li sentis brudadon en sia kapo kaj ekaldis sur benko antaŭ la stacidomo.

La stacidomo alproksimiĝis. „Ĉu vi estas mal-sana, sinjoro?“

„Nur ioma kapturino!“  
„Unu momenton! Mi alportigos al vi glason da freŝa akvo.“ La oficisto faris signon al stacidom-servisto. Kiam tiu ĉi estis dononta glason da akvo al la fremdulo, li trovis lin mortiĝanta. Konsternite li direktis kelkajn demandojn al li; sed li nur aŭdis nekomprenblajn vortojn. La stacidomo alkuris. „Kio estas? Li ja mortas!“ La servisto kapjesis. „Ĉu li nenion plu deziris?“ demandis la stacidomo. „Mi ne povis kompreni lin; li balbutis ion, kiel:

— „En la montojn!“ —

## La ekonomia vivo.

Foje mi plendis al kolego, antaŭ nelonge reveninta el rusa kaptiteco, ke la vivo estas terure malfacila. Oni ne havas suŝcon eĉ por manĝi. Baldaŭ la intesoj tiom kuntiriĝos, ke ili taŭgos nur por pneumatikaj kondukiloj, se oni intencus fariĝi vento- kaj ventro-parolisto; sed konsiderante, ke nuntempe ja ĉiuj parolas pri kaj pro ventro, tio ne estas ja esenpeza meto.

„Kontraŭe,“ respondis mia amiko, „mi estas ĉiam sata, eĉ monon mi sukcesas ŝpari, por fariĝi helpkongresano de la XIV-a.“

„Ĉu vi volas kredi al mi, ke vi interrilatas kun la diablo, kaj ke li forŝtelas por vi la riĉegan menuon de bankistoj kaj diversaj valut-spekulantoj?“ mi demandis konsternite.

„Ne, tiel altan postenon mi ankoraŭ ne atingis en la socia vivo.“

„Eble vi eltrovis, kiel fabriki nutr-eliksiron el aero; ni ĉiuj ja scias, ke ĝi grandparte konsistas el nitroĝeno, kio estas la ĉefa nutr-elemento?“ demandis mi, intencante montri, ke ankaŭ mi okupas min per pli altaj sciencaj problemoj.

„Ho ne!“ li ridetis, „ne parolu aerajn. Io simila, ne aero, sed akvo ĝi estas!“

En mia kapo ĉi akvaĵo komencis boli kiel maro, sed nenion mi komprenis. — Akvo?!

„Nu jes, mi trinkas teon.“

„Teon? Nu jes, iam, antaŭ longa tempo ankaŭ mi trinkis teon, precipe vintre, vespere... sed nuntempe tio ne estas ebla. Rumo estas tro kara, pro la prezo de citrono eĉ la mieno fariĝas acida, kiamaniere do trinki teon?“

„Pli bone ni do diru: ĉajon,“ li klarigis. „Ĝi estas rusa eltrovo. Oni bezonas nur herbon de teo kaj bulantan akvon.“

„Kaj sukero?“

„Nepre ne. Ĉajo anstataŭas ĉion. Matene mi trinkas du glasojn da hela teo, kun peco da pano. Tagmeze mi tagtrinkas unu glason hele — ĝi estas la supo, unu glason malhele, ĝi estas legomaĵo, plian glason nigre, denove kun pano, ĝi anstataŭas rostaĵon, fine glaseton da te-esenco, anstataŭ kafo. — Jen la tuta menuo. Vespere mi faras same kaj mi asertas al vi, ke eĉ restajo ĉiam estas, tiel, ke ankaŭ gastojn mi povus regali, ekz. nun mi invitos la svedan kongreskaravanon.“

Kiel eble plej profunde mi pripensis la aferon, sed kiam en la profundo de mia manĝokesto mi trovis nenian konsilan kontraŭdiron krom peco da seka pano, mi akceptis la proponon principe kaj praktike.

De tiu tempo mi vivas bonege. Kelkfoje, se mi havas humoron aŭ ian daton memorindan, mi

Moineau rekomencis siajn eksperimentojn kaj anoncis, ke tie la akvo estis pura.

Ĉiuj diroj de d-ro Moineau estis kontrolataj, kaj la kontrolo konfirmis ekzakte tiujn ilin.

Ne bezone estas diri, kiajn gravegajn sekvojn tiu ĝojiga eksperimento permesas esperi.

R. L., Lyon.



### De arba trunko ĝis gazeto.

Por konstanti la tempon necesas por transformi arbon vivantan je gazeto, paperfabrikanto faris interesan eksperimenton. Je la 7.35 h. matene li ordonis faligi tri arbojn kreskantajn najbare de lia fabriko; post senŝelgado ili estis transportataj al la fabriko. La transformado de la tri trunkoj je fluida celulozo efektiviĝis tiel rapide, ke jam je la 9.30 h. matene la unua rulajo de prespapero eliĝis el la maŝino. Ĉi tiu rulajo estis tuj aŭtomobile transportata al la presejo de tagjurnalo, troviganta kvar kilometrojn de la fabriko. Jam je la 11 h. antaŭtagmeze la gazeto estis vendata surstrate. Do, estis necesa tempospaco de nur tri horoj kaj 25 minutoj, ĝis kiam la publiko povis legi la plej novajn raportojn presitajn sur materio, devenanta de la arboj, sur kies branĉoj la birdoj sonigis siajn kantojn ankoraŭ en la sama mateno.

Mi dezirus, ke mia artikoleto per miraklo kun la sama rapideco aperu en ET.

Kiuza.

Sendu  
manuskriptojn literaturajn!



je tagmezo kaj iris al la Hotel d' Angleterre, fama kiel la domo, en kiu la angla poeto Byron verkis sian poemon „The Prisoner of Chillon“. Tio la lokaj samideanoj afable akceptis la vizitantojn, kaj antaŭ la tagmanĝo aro da gekantistoj ĉarmis per sia muziko. Inter la manĝoj, paroloj de reprezentantoj de diversaj nacioj kreis intereson.

En la vespero post la reveno al Genevo r-markinda familia akcepto okazis en la Domo de l' Etuloj de la Instituto J. J. Rousseau. Post esploro de la ĉambroj, en kiuj la junaj lernantoj de la Instituto ricevas instruadon laŭ tre interesa maniero, prof. Pierre Bovet, la direktoro de la Instituto, faris paroladon tute libere kaj flue. Prof. Bovet estas fama tra la tuta mondo pro siaj pedagogiaj eksperimentoj, kaj liaj vortoj estas do aparte interesaj.

### La Parolado de Prof. Bovet.

#### Gesinjoroj!

Mi scias, ke Esperanto estas ilo ne nur por monda paco, sed ankaŭ por krei tiun grandan rondon familian, pri kiu kantis la fondinto de Esperanto. En tiu familio, mi devas konfesi, kaj vi certe vidis, ke mi estas tre juna membro; kaj mi esperas, ke la pli maljunaj estos tre indulgemaĵoj pri miaj eraroj. Mi devas diri al vi, kiam kaj kiel mi estas enirinta en la familion.

Kiel multaj el vi, mi estas homo tre okupata, kaj mi ne havas tempon aŭ okazon por lerni novajn lingvojn, sed feliĉe, aŭ malfeliĉe, dum la lasta tempo mi estis malsana. Ĝi estis nur ne-grava malsano — la gripo, eĉ mi povas diri, la gripeto; sed dum la tagoj de mia gripo mi profitis por lerni Esperanton, kaj post kvar tagoj mi havis la tre agrablajn sentojn koni la lingvon.

Mi ankoraŭ ne povas paroli tre facile aŭ flue. Ĉi tiu estas la unua paroladeto, kiun mi faras.

Sed eble estas necese, ke mi diru al vi, kio estas tiu ĉi domo, kaj kiuj estas la direktoroj de la Instituto. La Instituto de Rousseau tute ne estas Esperantista lernejo. Ĝi estas centro pri studado pri la infano kaj la edukado de infanoj. Mi kredas, ke estas tre necese koni la infanojn pli bone ol ni konas ilin hodiaŭ. Ni havis moton: „La infanoj estu niaj instruistoj!“ kaj ni havis la senton, ke estas tre necese koni la infanojn pli bone ol ni hodiaŭ konas ilin. Tiu ĉi domo — la domo de la etuloj — akceptas ĉi tie infanojn de tri ĝis ok jaroj — kaj la infanoj, kiuj venas ĉi tien, estas gvidataj de du mirindaj instruistoj. Vi vidas, ke la infanoj ĉi tie estas tre liberaj. Ni profitis el la spertoj de d-ro Montessori kaj aliaj en diversaj landoj. La ludo ne estas, kiel oni ofte kredas, ekzerco senutila. Ĝi estas kontraŭe ekzerco tre necesa por la infano, kaj la naturo elektis tiun vojon por doni al la infano la ekzercojn por ĝiaj okuloj, ĝiaj membroj kaj ĝia voĉo. Kaj ankaŭ ni en nia lernejo devas doni al la infano la okazon por ludi. Kiel ofte en niaj lernejoj la lernejo estas sen gajeco, sen ĝojo kaj sen ludo!

Ni kredas ankoraŭ, ke se la pedagogiaj diskutoj estas tre ofte neutilaj, tamen estas eble fari utilajn la debatojn, se oni provas mezuri la rezultojn de ĉi tiu instruado, de ĉiuj metodoj — mezuri la rezultojn estas la granda ideo de la scienca ekzamenado en ĉi tiu fako, kaj ankaŭ en nia fako estas tre necese kunigi rezultojn, kunigi faktojn.

Kiel ni renkontis la demandojn pri Esperanto? Ni aŭdis pri Esperanto multajn opiniojn, kiuj ne estas bone fonditaj, kiuj estas antaŭjuĝoj, kiuj ne estas bone metodaj, sciencie provitaj, kaj ni pensas, ke nia Instituto havas la devon rikolti precizajn faktojn por scienco konstatati, kio estas Esperanto, kaj kia estas ĝia influo en la lernejoj, kaj tiel ni venis al la ideo pri ĉi tiu konferenco.

Ni kredas, ke unue estas necese studi la infanon, koni ĝin kaj poste klopodi eduki ĝin. Laŭ tiu metodo oni esperas rikolti faktojn pri Esperanto en la lernejo. Vi portis al ni tiujn faktojn dum la konferenco.

\* \* \*

D-ro Privat respondante diris, ke la parolado de prof. Bovet estas preskaŭ miraklo. Ĝis nun Esperantistoj havas la sperton, ke kiam scienculo alproksimiĝas al la afero, tio estas por rigardi la lingvon, kaj post rigardeto diri, ke se ili estus farintaj la lingvon, ili estus farintaj ĝin pli bona. Tamen pri la plibonigoj ili ne konsentas inter si. Prof. Bovet proksimiĝis al la tasko laŭ pli bona scienca maniero. Li vidas la faktojn senpartie. Li enketas pri la faktoj mem. Li montris al ni, ke ni ne timu prezenti nian aferon tute senkaŝe kaj senpartie antaŭ la mondo. Nia lingvo kaj nia afero havas nenion por timi, sed ĉion por gajni el la scienca ekzamenado.

Onklo.

## Impresoj al konferencano.

Post ni kuŝas la kelkaj tagoj, kiujn ni sen iu fantazio povas nomi la plej gravan ĝisnunan okazaĵon en la Esperanta movado. 96 delegitoj el 28 landoj, efektive delegitoj kaj fakuloj en bona organizado diskutis pri Esperanto en lernejoj. Aŭskultis kaj aplaudis ilin ne centoj aŭ miloj da entuziasmigita Esperantistoj. Sed viroj ĉeestis, kiuj — parte kiel skeptikuloj — volis ekzameni la aferon: ĉu Esperanto fakte estas la gravajo, kia ĝi pretendas esti? ĉu nur ludajo? Representantoj de la Ligo de Nacioj volis informiĝi pri Esperanto, kiun ili devas pritrakti en venonta aŭtuno.

La rezultoj? — Eĉ ne ŝatante la ofte dum Esperanto-kongresoj viditan kutimon aplauditi ĉion kaj „eg“lgi ĉion bonan, oni povas diri: Malgraŭ seriozaj kaj severaj ekzamenoj kaj diskutoj ĉio, kio estis proponita por Esperanto, estas aprobita kaj akceptita laŭ programo. La gastoj, komence

aŭdinte la anglalingvan salutparoladon de l' Generala Sekretario de la Ligo de Nacioj, pli ol miris, kiam ili poste dum tagoj aŭdis nur unulingvajn diskutojn ne malfacilitajn per interpretado. Ĉu ne multaj el ili memoris je la kunsidoj de la Ligo de Nacioj? — ? —

Ankaŭ ni Esperantistoj sentis ion novan: Unufoje ni reprezentis nian aferon oficiale, ne nur manifestacie kune kun aro da nerespondecaj gesamideanoj.

Kvankam preskaŭ tro multa, la tuta laboro estas farita dum laŭprograma tempo sub la gvidado de s-o Privat, kiu — same energie kiel afable — prezidis la kunsidojn kaj modele estris la tutan materion. Helpis lin ordo, kiam oni ne ofte trovas simila, ĉu en akceptejoj, ĉu en hotelo, ĉu dum akceptoj aŭ ekskursoj, ĉu dum la kunsidoj mem.

La karaktero de la raportoj estis diversa. Jen unu parolis fajre pri la graveco de Esperanto por interpopola alproksimiĝo; jen brita delegito raportis detale pri spertoj faritaj dum instruado al infanoj; jen la bulgaro informis pri la 30 gimnazioj, en kiuj Esperanto estas instruita en Bulgariujo; jen unu el la germanaj delegitoj donis klarajn ekzaktajn statistikojn kun multe da ciferoj; jen — sed kiu povus priskribi ĉiujn impresojn ricevitajn? — Ĉar ne ekzistis malfacilaĵoj en konversacio, ankaŭ la personaj interrilatoj rapide fariĝis pli amikaj ol kutime ĉe konferencoj de dekoj de nacioj. Ne estis konstatabla iu malfacileco inter anoj de Granda aŭ Malgranda Entento, de „venkintaj“ kaj „venkita“ aŭ „neŭtralaj“ ŝtatoj, ĉar ja ofte nur post pli-malpli longa konversacio oni ekscias la nacielecon de la kunparolanto. Kaj estis pli ol kutimaj afablaĵoj, kiam ĉiam kaj ĉiam denove la neesperantistaj gastoj certigis, ke ili nun plene konvinkigis pri la granda rolo de Esperanto kiel lingvo por internaciaj kongresoj.

Antaŭ nelonge ankoraŭ d-ro Nitobé diris, ke ni laboru, ne tro esperu. Espereble li, kiu ĝis nun partoprenis nur nian manifestacion en Praha, nun vidis, ke Esperantujo ankaŭ estas lando de serioza ĉelscia laboro, kiu sola nin helpos atingi la celon, al kiu la unua oficiala paŝo estas farita en Genève.

Konferencano.

## La Instruistaro kaj Int. Scienca Asocio.

Responde al la artikolo de s-o Sembera en n-o 76 ni ricevis kelkajn artikolojn, de kiuj ni nur volas represi tiun de s-o prof. König, Miskolcz, kaj parton de tiu de s-o Mačernis, Kaunas. Ĉiuj skribintoj aprobas la opinion de s-o Thiel kaj esprimas la deziron al baldaŭna senresta unuiĝo de Int. Scienca Asocio kaj Int. Asocio de Instruistoj! Konstanta manko de loko devigas nin, mallongigi la interesan diskutadon kaj finiĝi ĝin per tiu ĉi lasta publikigo!

Miskolcz, la 28. de marto 1922.

#### Estimata Sinjoro Redaktoro!

En n-o 74 kaj 76 aperis artikoloj pri la Instruistaro rilate al IAI kaj ISA. Permesu, ke ankaŭ mi skribu kelkajn vortojn pri ĉi tiu temo.

Ĝuste skribas s-o Sembera en n-o 76, ke el ĉiuj profesioj eble la instruistaro estas kun plej granda nombro reprezentata en Esperantujo. Prave li skribas, ke ni povas havi gravan rolon eble jam en la proksima estonteco, se Esperanto estos oficiale enkondukata en la lernejojn, do ni devas nin prepari al la laboro per koncentriĝo en unu sola asocio. Mi tamen favoras la proponon de E. V. D. L., ke ni aliĝu ĉiuj al ISA formante specialan sektion de ĝi kun larĝa aŭtonomio. Ĉu vi demandas, kial ne en la jam ekzistanta IAI? Ĉar, se la diversaj internaciaj unuiĝoj Esperantistaj povas nur vegetadi ankaŭ jam inter la antaŭmilitaj multe pli bonaj ekonomiaj cirkonstancoj, havante nur almenaŭ 100—200 membrojn, kiel ili povus plenumi siajn destinojn nuntempe? Laŭ mia opinio la nuna intereso de l' Esperantomovado devigas la Esperantistaron, ke ĝi koncentriĝu en unu aŭ du internaciaj organizaĵoj, kiuj jam per multnombro de iliaj membroj imponu. Se IAI havas kelkcentojn da membroj, ĝi restos ankoraŭ nur malgranda, malforta unuiĝo; sed se ni aliĝos al ISA, la agadon de la pedagogia sekcio ĉiam plifortigos ankaŭ la aliaj sekcioj, kiel ankaŭ ni helpos la aliajn sekciojn por atingi iliajn celojn. Plie ISA havas pli larĝan agadkampon ol IAI, kiam ĝi devigas siajn membrojn helpi unuj al aliaj ĉe siaj sciencaj laboroj, kaj ĉefe ISA volas organizi kaj direkti la redaktadon de la fakvortaroj, kie devas ankaŭ la instruistaro kunlabori.

Estas vere, ke IAI jam ekzistas, sed ankaŭ se ĉiuj instruistoj estus ĝiaj membroj, oni devus proponi, ke IAI aliĝu kiel sekcio al ISA, same kiel jam faris TEKA. Do la propono de s-o Thiel estas tute prava, nur s-o Sembera komprenis ĝin malĝuste. Komprenible nek E. V. D. L., nek la Germana Esperanto-Kongreso povas decidi, ke IAI aliĝu, ili nur decidis la aligon de E. V. D. L. kaj proponos al la estraro de IAI fari samtiel. Kiam la Esperanto-movado estos jam sufiĉe forta, kiam ni jam estos sufiĉe multaj, fine kiam ISA jam plenumis sian specialan devon, la sekcio povos formiĝi tute memstaraj kiel sendependaj internaciaj unuiĝoj kun diversaj celoj. Ĝis tiam ni evitu la malkonsenton kaj la jaluzon, paŝu ni unuece al nia komuna celo, al la triumfo de la ideo de nia mortinta kara majstro.

Lajos König,

profesoro ĉe la urba supera komercierlernejo por knabinoj,

Miskolcz, Hungario.

\* \* \*

S-o Mačernis skribas interalie: . . . La nomitajn dezirojn de geinstruistoj bone povus plenumi monata, serioza, ne e.p.r. ampleksa pedagogia artikolo. Dank' al Dio, ĝin baldaŭ ni havos en „Scienca Revuo“. Tiu kunfandiĝo de „Pedagogia Revuo“ kun „Scienca Revuo“ estas diversilate tre dezirinda, sed nur je unu grava kondiĉo, nome, ke ni instruistoj trovu en ĝi ne kelkajn paĝetojn pri nia afero, sed ĉiumonate almenaŭ 80—100 paĝojn! Al ni, alkiutimigintaj al niaj mizeraj folietoj-gazetoj, la nomita paĝnombro ŝajnas gigante granda. Sed ni fine komprenu, ke per niaj mizeraj folietoj ni neniam povas imponi al la mondo. . . Pri tio, ke ĝi havu abonantojn, ni povas ja zorgi. Nun en Litovujo kelkcent da instruistoj eklernis Esperanton. Mi hontus instigadi ilin aboni mizeran pedagogian folieton, sed kiam mi estos ricevinta la unuan ampleksan numeron de S. R., mi povos sen hontruĝo iri en instruistkunvenon kaj sukces-plene proponi abonon! . . .

\*

\*

\*

Por fini ni presas kelkajn vortojn petitajn de s-o d-ro Döhler: Tui post apero de la artikolo de s-o Sembera, s-o Thiel kaj mi mem penadis per interkorespondado distri kelkajn miskomprenojn kaj timojn de s-o Sembera. Ĉar s-o König pritraktas la saman, ni rezigas denove skribi pri ili. Ke ni povas esti kontentaj, rezultas el la promeso de s-o Sembera mem aliĝi sin al Int. Scienca Asocio. Espereble la kongreso en Helsinko alportos al ni la oficialan decidon de kunfandiĝo inter IAI kaj ISA.

Ankoraŭ vorton pri la entuziasmaj kaj optimistaj vortoj de s-o Mačernis: Ĉiu Sekcio ricevas en la Revuo tiom da spaco, kiom ĝi bezonas por siaj oficialaj sciligoj, kaj en la neoficiala parto ni akceptos ĉiun seriozan artikolon, kiu sin akomodas al niaj prienhavaĵaj principoj; se ni ne ricevos multajn tiajn, ni ne povas presigi ilin! Sed kiam Sekcio (ekz. la Pedagogia) estos tiel grandiginta, ke ĝi povas garantii plenumon de minimume dek seso da paĝoj pomonate per (pedagogia) artikoloj (ĉiu redaktoro konsentos, ke la plej granda malfacilaĵo estas fakte ricevi la prometajn artikolojn!), mia persona opinio estas, ke la Sekcio eldonu propran gazeton kiu kvazaŭ Aldono al la Revuo havu la saman aspekton, grandecon ktp. kaj estu abonebla de ISA-membroj je favorprezoj. La Sekcio tamen restu interne de la Asocio kaj la „Revuo“ ankoraŭ plue enprenu la Oficialajn Sciligojn kaj la terminologian parton. Pro taktikal kaŭzoj mi devus konsili, ke oni ne komisiu unu eldonejon je eldonado de ĉiuj sciencaj gazetoj, sed donu la novajn al alia eldonejo en alia lando!

Alcentriĝo de la ideoj; discentriĝo de la rimedoj!

## Esperanto kiel internacia literatura lingvo.

De la 17-a ĝis 20-a de aprilo okazis en Bruxelles la I-a Kongreso de Federacio Internacia de la Arto, Literaturo kaj Scienco (FIALS). Famaj verkistoj kiel Han Ryner, Napoléon Roynard, Emile Pignot, A. Mercereau, Canudot estis membroj de tiu ĉi federacio. Han Ryner prezidis la kongreson.

La bruselaj SAT-anoj fluokaze starigis Esp. ekspozicion en la kongresa sidejo. Kamarado E. Lanty, ĉefredaktoro de Sennacieca Revuo, ĉeestis la kongreson kaj sukcesis voĉdonigi unuanime jenan rezolucion:

La I-a Kongreso de Federacio Internacia de la Arto, Literaturo kaj Scienco (FIAS) —

- Konsiderante unupartie,
1. ke la lingvodiverseco estas baro kontraŭ la disvastiĝo kaj bona funkciado de nia Asocio;
  2. ke uzado de unusola lingvo faciligus konsiderinde niajn internaciajn rilatojn;
  3. ke estus granda profito, se la literatura kaj sciencaj verkoj estus tradukitaj en lingvo tutmonde konata;
  4. ke la lingvokomuneco estas unu el la bazoj de internaciismo;
  5. ke nia Asocio devas kunhelpi ĉiujn progresojn kulturajn;

Konsiderante aliparte,

- a) ke estus preskaŭ neeble interkonsenti pri elekto de nacia lingvo;
- b) ke la alpreno de tia lingvo kreus specon de imperialismo favore al la lando, kies lingvo estus alprenita;
- c) ke ĉiuj naturaj lingvoj estas tre malfacile lerneblaj;
- d) ke tridekkvar-jara praktikso pruvis nerefuteble, ke Esperanto, lingvo kreita de la genio de Zamenhof, kaj kiu estas kvazaŭ kvintesenco de ĉiuj lingvoj hindoeŭropaj, estas perfekte vivebla, riĉigebla kaj perfektegebla, ke ĝi estas jam tre disvastigita en ĉiuj landoj de la mondo kaj tiufakte konvenas tute por igi la helplingvo komuna por ĉiuj homoj;

Pro ĉiuj-ĉi motivoj, la Kongreso konsilis la lernadon de Esperanto al ĉiuj anoj de FIALS kaj ĝian uzadon por la internaciaj rilatoj. Komisias la aŭtoritatajn reprezentantojn de FIALS, ke ili faru ĉiujn utilajn klopodojn, por ke la registaroj enkonduku en la programon de la instruado de ĉiuj lernejoj la studadon de lingvo tia, kia estas Esperanto;

Invitas insistie ĉiujn membrojn, ke ili uzu ĉiukaze sian personan influon por faciligi la propagadon favore al lingvo internacia.

## Foiroj.

### La Foiro de Lyon.

La Informa Oficejo (Office des renseignements de la foire de Lyon), 27, rue Gentil, Lyon, el-

donis en Esperanto cirkuleron, en kiu ĝi sciigas pri senpaga livero de informoj koncentrantaj la foiron aŭ ne, kaj insiste petas ĉiun komercistojn uzi ĝiajn servojn. Ĝi korespondas en Esperanto. Tiun sukceson ni ŝuldas al la estraro de la grupo „L' Amicale Espérantiste“.

### Foiroj kaj ekspozicioj okazantaj de 1.—16. majo 1922.

- 1.—6. London. Fotografla Ekspozicio.
- 1.—15. Den Haag, Nederlando. Aŭtomobiloj, aeroplanoj, motorboatoj.
- 4.—11. Christiania. Specimena Foiro.
- 6.—16. Utrecht, Nederlando. VI-a Spec. Foiro.
- 6.—21. Bandoeng, Nederl.-Hinda Te-Ekspozicio.
- 8.—15. London. Tabak-Ekspozicio.
- 10.—31. Valencia. V-a Spec. Foiro.
- 11.—25. Trieste. Int. Spec. Foiro.
- 14.—31. Padova. Elmontrito de sciencaj aparatoj en la Foira Kvartalo.
15. (ĝis 15. junio) Lisboa. Aŭtomobila Foiro.
- 16.—30. Napoli. II-a Int. Spec. Foiro.

### La Komerca Foiro en Bruselo.

London la 3. aprilo malfermiĝis la 3-a Komerca Foiro en Bruselo, kiu daŭros ĝis 19. aprilo. Antaŭ du jaroj la unua foiro estis organizita por helpi al la kiel eble plej rapida restarigo de la belga industrio kaj diskonigi ĉi tiun tra la tuta mondo. La energia laboro, al kiu multe helpis la gazetaro, kondukis al brilaj rezultatoj. La okazintaj foiroj pli kaj pli vastiĝis, kaj la nuna povas konkuri kun la plej grandaj en la mondo: ĉiuj landoj estas reprezentataj, kaj ĉiuj landoj sendas aĉetantojn. Manko de sufiĉa loko estis kaŭzo, ke oni devis malakcepti pli ol cent demandojn por pli ol 2000 m<sup>2</sup>. La nombro de partoprenantoj estis 1602 en 1920, 2349 en 1921, kaj 2204 en 1922. La okupitaj kvadrataj metroj estis 19419 en 1920, 29720 en 1921 kaj 31250 en 1922. La reprezentitaj landoj estis 14 en 1920, 20 en 1921, kaj 24 en 1922.

## Mallongaj Esp. Sciigoj.

### Esperanto en Japanlando.

#### Petskriboj pri Esperanto al Imperia Parlamento en Tokio.

Ni elĉerpas el „La Revuo Orienta“: 22 ĝejapanoj, inter kiuj d-ro M. Mijajima, s-oj H. Amano, S. Satake, K. Janagida, M. Jikuchi, C. Fujisawa, U. Usami, loĝantaj en Genève, alsendis al la Japana Parlamento petskribojn pri publika esplorado de Esperanto. La petskribo estas prezentita al ambaŭ Domoj de la Parlamento, sed ĝi havis mankon en la formo, ne surhavante adreson, aĝon kaj stampon de la subskribintoj, kaj ĝi estas forĵetita. Malkontentaj pri tio, d-ro K. Nakamura, membro de Imperia Akademio, prof. d-ro K. Kuroita, S. Hozumi, G. Suehiro, A. Oka, d-ro Kii kaj aliaj preskaŭ cent membroj subskribis novan petskribon pri esploro de la demando enkonduki Esperanton en la programon de lernejoj en la Imperio. Pri jes- aŭ ne-sukceso de tiu ĉi petskribo ni ĝis nun ne estas informitaj.

La Imperia Akademio de Japanujo, al kiu apartenas famaj sciencistoj, aŭskultis la 12. jan. leklon de ing. K. Osaka pri Esperanto kaj Esperantismo. La prezidanto de la Akademio d-ro N. Hozumi enskribiĝis kiel subtenanta membro de Jap. Esp. Instituto. D-ro Arika Inokuchi, fama mekanikisto, komencis lerni Esperanton.

### Skoltoj en Pollando.

La junula kaj skolta organo „Pionier“, Kraków, str. Bracka 15, enkondukis konstantan Esp. fakon dukolonan redaktatan de s-ano Salo Grenkamp-Kornfeld. Skoltoj adresoj estos senpage enpresataj.

### Bulgario.

Kursoj: En Bjala kun 40 p., en progimnazio de Karlovo por anoj de 3-a klaso kun 42 p., en vil. Aleksandrovo por geinstruistoj.

## Gazetaro.

Pri la Konferenco de Genève raportis pli-malpli detale preskaŭ ĉiuj lona gravaj gazetoj de la tuta mondo. La raportojn ili ricevis plejparte de la konatitaj gazetiinformuloj. Jen evidenta pruvo pri la serioza impreso, kiu la konferenco faris en ĉiuj, ankaŭ neesperantistaj rondoj. Estas neeble al ni, citi la titolojn de ĉiuj gazetoj, kiuj enpresis raportojn pri la konferenco kaj pri kiuj ni aŭdis aŭ kiujn ni vidis ĝis nun. Komprenible, la gazetoj de Genève donis tre detalajn raportojn, ekz. „La Suisse“ kaj „Le Journal de Genève“ (ambaŭ la 19., 20. kaj 21. 4.). „L'Ouvre“ en Paris enhavis la 19. kaj 21. 4. detalajn raportojn de speciala korespondanto.

En la gazetaro de Wien, Aŭstrio, aperis de 1.—21. aprilo (do en tri semajnoj) 53 artikoloj kaj notoj pri konferenco de Genève, pri Germ. Esp. Instituto, pri Esp. ĉe lernejoj en Leipzig, pri Esp. en Japanujo, pri Esp. kongreso en Salzburg, k. a., el ili 42 de la gazet- informuloj gvidata de d-ro Pfeffer. Jen la titoloj de la Vienaj gazetoj, kiuj raportis pri Esperanto: Abendblatt, Arbeiter-Zeitung, Arbeiter-Sängerzeitung (raportis pri Unua Kanto-Societo „Zamenhof“ en Wien), Der Abend, Deutsches Volksblatt (mencis Esperanton en fantazia rakonto el la jaro 2516), Die Rote Fahne (Ĉu Esp. estas utopio?), Extrablatt, Freie Presse, Morgenzeitung, Neugierkeits-Weltblatt, Reichspost, Tageblatt, Volkzeitung kaj Wiener Zeitung.

Phenix Caixaeral, Fortaleza-Ceara, Brazil., 12. 3. (Noto pri Esp. kurso de „Nova Samideanaro“.)  
The Yorkshire Observer, Bradford, Angl., 10. 4. (Granda ĵurnalo, enhavas bildon de Esp. klaso en Huddersfield kun klariga teksto.)  
La Dépêche Dauphinoise, Grenoble, Franc., 19. 4. (Pri la Esp. kongresoj.)  
Bürgerblatt, Emmerich, Germ., 18. 4. (Esp. en Brazilo.)  
Danziger Volksblatt, 15. 4. (Artikolo.)  
Danziger Volkstimme, 15. 4. (Noto pri Esp. kongreso Danzig.)  
Jutarnilist, Zagreb, Jugosl., 16. 4. (Longa artikolo pri Esp. en 1921.)



Unu postulu la "Victoria" Eksport-Preziliston

germana-hispana kaj germana-angla lingvoj.

## Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo

(Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau)  
Dierraardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝargas per la dissendo de cirkuleroj.  
Prokuras komercajn adresojn.  
Prizorgas la anoncadon en Nederlando.  
Interrilatigas kun nederlandaj komercistoj kaj industriistoj.  
Sciigas la kurzojn de valutoj kaj valorpaperoj.

## HUNGARA VINO.

La Tokaj-Hegyalya-Provinca Vin-komerca A. S. Budapest

**malmultkoste**

eksportas unuarangajn vinojn al ĉiuj landoj.  
(En lastaj monatoj oni sendis al Brazilio, Ĉinio, Nederlando, Germanio.)

— Botelvinoj, —  
Mondfamaj „Tokaj“-vinoj!

Seriozaj firmoj kaj reprezentantoj ricevas ofertojn pere de

Paŭlo Balkányi, Budapest VI,  
Hajos u. 15.

# 50000

germanajn markojn ni deziras pruntepreni por nova preslaborejo, kies konstruigojn ni ĵus komencis. Ni deziras la kapitalon de diversaj donontoj en malgrandaj sumetoj aŭ la tutan sumon de unusola dononto. La konstruado kosta ĉ. 150 000 gmk. Ni garantias rentumon ĝis 10%, laŭ postulo de la donontoj. Ofertojn petas

Frato Jung,  
presisto de „Esperanto Triumfonta“,  
Horrem bei Köln, Germ.

## Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinekvaj enpresoj) kosta po du enpresoj kaj po 20 vortoj 0.20 dol., 0.50 hfl., 1 nord. kr., 1 sil., 1 sviz. fr., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fr., 3 lit., 7 fmk., 8 kc., 25 mk., 60 hung. kr., 250 pmk., 250 austr. kr., internacie 5 e'amp. resp.-kup.; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abononto, de aliaj ni enpresas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas alveni 10 tagojn antaŭ publikigo.

NASKIĜO. Al ges-anoj Szabó en Budapest naskiĝis filo: Georgo Szabó.

EDZ(IN)IĜO. La astrologisto s-o J. Rabestana (la mistera viro, kiu antaŭdiris la mortigon de la fondinto de Portugala Respubliko kaj multajn aliajn okazintaĵojn tiulandajn, ĵus trovis la sekretan, por ke li povu sukcesigi en felicita edz(in)igo aŭ eviti malfelicitan edz(in)igon. Ĝi estas scienca eltrovaĵo facilkomprenebla por ĉiuj personoj. Bonvolu sendi vian nomon, adreson, naskiĝdaton kaj la sumon de 10 (dek) frankoj aŭ laŭkurzan samvalutan sumon en monspeco tiulandaj, se vi volas sciigi pri tiu mirindaĵo, kiu felicigos vian tutan vivon. Mi respondas laŭvole en Esperanta, portugala, franca aŭ angla lingvoj. Adreso: R. Pascoal de Melo, 105, 1-o, Lisbono, Portugalio.

ŜANĜO DE ADRESO. Mia nova adreso estas: Vold. Varankin, 9 Mir. nosickaia, N Novgorod, Rusio. Interŝanĝas poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn. Liveras interŝanĝe rusajn Esperantojn.

POR FACILIGO DE L' INSTRUADO kaj neniam erare apliko de l' prepozicioj, afliksoj, partolpoj ktp. mi serĉas tiurilatajn bildojn, eble simple sed klare desegnitajn sur poŝtkartoj, kunmetote taŭgajn por multobligo. Kiam la kolekto sufiĉas (eble fino de 1922) mi promesas sendi al ĉiuj kunlaborintoj la rezultatan. — Hans Böning, Stuttgart, Libanonstr. 45

KOMERCO. S-o Ivan H. Krestanoff, Nicolaisstr. 4 b, Dresden, Germanio, okupiĝas pri komerco kaj reprezentado kaj petas ofertojn.

AĈETAS AŬ INTERŜANĜAS la numerojn 2-8, 10-18, 20-24, 26, 41 de ET 1920/21. — S-o E. V. Schade, Wien 1, Franziskanerplatz 3/3

OFICO EN TEKNIKO. Kiu samideano en Germanujo donos al junulo 18-jara, talentita en desegno kaj pentro, oficon en tekniko ktp.? Ofertoj: Postlagerkarte 28, Pellerberg, Germanujo.

Nederlanda Anonima Societo

Luksa-pano Fabrikoj

antaŭe Henri J. Carels.

50 Butikoj:

Den Haag, Haarlem, Amsterdam.

Lunĉejo Carels

(ĉefo: H. A. Schawächter)

65 Weimarstraat, Den Haag.

Oni parolas Esperanton.

## La Interŝanĝo

Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondantoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojojn jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aliĝantoj senditan nur al la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj.  
Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.  
A. Bonnefous, Direktoro, Béziers (Hérault),  
Francujo, 3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

Unuaranga

## HOTELO VICTORIA

### BYDGOSZCZ-BROMBERG

(Polujo) apud la Stacidomo

rekomendas sin al la Publika.

Restoracio.

Vinejo. Renkontejoj por Fremduloj.

Baltika Marbanejo

## WARNEMÜNDE

Pensio kaj Restoracio „Erika“,  
Strandweg 12a.

Luksaj loĝejoj, tre malkaraj por eksterlandanoj (ĉar germana valuto).

Wilhelm Scheel, delegito de U. E. A.,  
Telefono 147.

## Malkaraj Korbmebloj

riceveblaj el pola fabriko pogrande kaj poretale. Kompletaj salonoj, konsistantaj el 6-10 pecoj (tablo, sofo, du foteloj, du seĝoj, unu taboreto, du flordestaloj kaj unu florujo) kosta nur 72000-82000 pol. mk.

Postulu fotogr. desegnojn kaj informojn de

Prof. Miecz. Sygnarski,

Bydgoszcz Polio Kordeckiego 19

ESPERANTO PRAKTIKO. Mi deziras aĉeti Esp. Praktiko 1920, n-oj 1, 5, 6. Alsendo kontraŭ pagoŝarĝo al Otto Lumpe, Trautenau, Ĉeĥoslovakio.

D-RO L. L. ZAMENHOFA BILDO laŭ originala pentraĵo sur belega papero (granda 25 : 32 cm.), necesa por ĉiu Esp. hejmo, ĉambro, grupo, societo, kurso, kunveno; vera donaco al ĉiuj progresemaj kursanoj; kosta 35 germ. markojn. — Dudek diversaj Esp. poŝtkartoj, silaetoj kaj portretoj de Zamenhof, belaj propagandiloj en arta Esp. maniero, kosta nur 20 germ. markojn. Kune kun la granda Zamenhof-bildo 50 germ. markojn. — Sendas P. Hirtow, Berlin-Charlottenburg, Goeihestr. 15, Germ.

SERCATA PERSONO. — S-o Porta, S. Pellico 1, Torino, Italio, petas informojn pri Giuseppina Surgumova, kiu loĝis en Kievo, Puŝkinskaia 19, loĝejo 28.  
500 ADRESOJ DE JAPANAJ KOLEKTANTOJ de poŝtkartoj ilustritaj, poŝtmarkoj ktp. estas aldonitaj al BES-adresaro (4-a eldono) aperanta en majo 1922. Prezo: 1.50 sviz. franko. Sendu bankbiletojn aŭ neuzitajn poŝtmarkojn! Por Aŭstrio, Polio, Rusio 50% valutrabo. Menu ĝin tu!, se vi volas certe havi BES-adresaron! Karel Jelinek, Poŝtako 60, Vinohrady, Ĉeĥoslovakio.  
POR KIA AJN PREZO mi aĉetos la n-ojn 1-12 de ET kaj la martan numeron de „Esperanto“ (UEA) de l' jaro 1921. Adreso: Deziderio Töviassy, Targu-Mures, Rumanio, Librejo Révész.

LA PLEJ FAMAJ SONORIL-KONCERTOJ en la tuta mondo okazas en Mechelen (Malines) apud Antverpeno en Belgio. Petu informojn de: Inlichingsbureau (Inform-oficejo), Bruel 125, Mechelen.

SIGELMARKOJN Esperantajn, insignojn, kaĉŭkejn stampilojn por societoj, poŝtkartojn liveras tuj Jozefo Kocotrek, gravuristo, Wien X, Arthaberplatz 5-14. Oni korespondas en lingvoj: ĉeĥa, germana, rusa kaj Esperanta. Postulu specimennon de Esperantaj sigelmorkoj kontraŭ 2 respond-kuponoj.

PASTRO L. W. CRONKHITE, post kvardekjara laboro, ekŝiĝas alian misian laborokampon ĉe Bassein, Burma, en frua aprilo, por reiri al sia uona hejmo. Nova adreso: Greenwich, N. Y., U. S. A., kien li alvenos ĉirkaŭ la unua de junio. Li aparte bonvenos leterojn kaj poŝtkartojn ilustritajn montrantajn gelnfanon. Responde li sendos leterojn kaj Burmajn kaj Hinduajn kartojn.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Th. Schneider, Lantsausstrasse 3, St. Gallen, Svizujo, deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun ĉiuj landoj. Sendu almenaŭ 50 malsamajn nedefektajn poŝtmarkojn kontraŭ la sama valoro de svizaj poŝtmarkoj.

## Vin-Barelojn

kaj aliajn barelojn novajn kaj uzitajn, el slovakaj kverko, en ĉiuj grandoj kaj en ĉiu kvanto ofertas je plej malaltaj prezoj

David Eckstein, Sered, Slovakio.

Korespondado: Germane kaj Esperante.

Importo. Eksperto.

## Pollanda Komerca Agentejo

Adolfo Oberrotman, Varsovio, Krak-Przedm.10

deziras ligi komercajn rilatojn kun gravaj eksterlandaj firmoj, speciale en teknikaj maŝinoj, manufakturo kaj galanteriaj artikoloj; donas ĉiujn informojn pri :- la polaj komerclokoj. :-

Nur pogranda firmoj bonvolu sendi ofertojn kun specimenoj aŭ katalogo.

Reprezentado. Perado.



Kapablaj reprezentantoj serĉataj por ĉiuj landoj.

Unuakvalitaj

## Ŝtalaĵoj de Solingen:

Raziloj, Razaparatoj, Razilklingoj, Poŝtranĉiloj, Tondiloj, Hartondiloj, je fabrikk-prezo.

Bildoj kaj originalaj specimenoj haveblaj.

Perado per

Komercista Esperanto Grupo  
Freiburg i. Br., Germ., Katharinenstr. 14.

Aldonu al demando respondkuponon.

## Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg; por Wien „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postamt 34  
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Begerstraat, Antwerpen. Poŝt-ĉeka n-o 28420.  
Bulgara: Georgi Ār. Gaŝevski, Bul. Marie Lutzka 46, Sofja  
Ĉeĥoslovakia: Otto Sklenčka, Hradec Kralové. Otto Lumpe Trautenau.  
Estona: Est. Esp. Unuiĝo, postkast 6, Tallinn.  
Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.  
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.  
Hispana: Konrado Doménech, Geronio, Rambla Alvarez 12-2.  
Hungara: Paŭlo Balkányi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.  
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamaki, Aojama, Tokio.  
Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.  
Litova: Paŭlo v. Medem, Smelnu g-ve 12, Kaunas (Kovno).  
Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 5125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.  
Rumana: Esperanto-Oficejo Ĉiuj.  
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.  
U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

S-o M Osaka, med. fak. studento, 185 Kaminŝigaĵa, Okajama, Japanujo, deziras interŝanĝi kun instruistoj desegnaĵojn kaj menlaborojn de gelernantoj.

Antonio Kerekes, Budapest VI, Eskültér 8, Hung., deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝas poŝtmarkojn.

Eugen Darden, St. Jobstraat 65, Antwerpen, Belgio, deziras korespondi por poŝtmarkoj kun ĉiuj landoj, escepte Germanlando.

C. Rouwens, 17 rue des Wallons, Anvers, Belgio, deziras korespondi kun Francujo, Germanujo kaj Serbulo.

S-o Juul Karnas, juna instruisto, Poortstraat 4, Berchem apud Antwerpen, Belgio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun la tuta mondo.

Pro multeco de ricevitaĵoj ne ĉiuj skribintoj povas esti tuj respondeataj. Al ĉi tiuj mi atable petas senkulpigon. — H. van Beek, Leliestraat 7, Dordrecht, Nederlando.

Ed Mittersteiner, Bergen 1, Oberbayern, Germ., deziras korespondi kun samideanoj el ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj

Du samideanoj deziras tutmondejn korespondantojn. — Adresoj: Rudolf Pivl, Trautenau, Ĉeĥoslovakio, Pragerstrasse 16; Alfred Hübner, Trautenau, Gebirgsstrasse 46.

Ar. Draščik, kooperativisto, Bratislava, Felbigerova 2, Ĉeĥoslovakio, deziras interŝanĝi poŝtkartojn, leterojn kun gealilanduloj, precipe pri demandoj ekonomiaj, artaj k. a.

Franz Rosenegger, Aschach a. Donau, Aŭstrio, deziras korespondadon kun samideanoj ĉiulandaj (letere aŭ karte); kolektas ŝtatan paperonon.

Korespondadon per poŝtkartoj kun ĉiulandaj samideanoj deziras Aleksandro Anisimov, Ruslando, Soroka, Korelskoj Trudovoj de Komun. Zesopilnij Zavod, n-o 57-58, domo 80.

Fraŭlo Friedrich Hahn, 19, Eichenpromenade, Perleberg, Germanujo, insiste petas korespondadon kun gebontemplanaj, gerebitanoj, aliaj geabatinenculoj eksterlandaj, kaj korespondadon kun Maroklando, Algerio kaj ĉiuj genordafrikanoj.

S-o Jan van Schoor, Sint-Laureyskaai 12, Antwerpen, Belglando, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. (bfl.) pri ĉiuj temoj; interŝanĝas ankaŭ poŝtmarkojn.

Kelkaj laboristaj junuloj deziras korespondi kun samklasuloj ĉiulandaj. Respondu al s-o E. Kull, Box 4, Korsnäs, Svuedujo, kiu peras la aferon.

S-o Alberto Weber, Alwasser II bei Bad Salzlbrunn, Hochwaldstr. 6, Germ., deziras korespondadon per ilustritaj poŝtkartoj kun la tuta mondo.

## Plej inda memorajo pri la Majstro

estas la memorlibreto:  
La lastaj tagoj de D-ro L. L. Zamenhof  
Bele kartonita albumo kun teksto kaj poemoj.

Presita sur luksa papero.  
Kun multaj ilustraĵoj laŭ originalaj fotoj.  
Prezo por ĉiuj landoj inkluzive afranko nur 17 germ. mk.

Abonantoj el bonvalutaj landoj povas ricevi la libreton por la prezo de 2 numeroj de ET; la pagon ni deprenos de la abonkonto; prezo por finnaj kaj ĉeĥoslovakaj abonantoj 3 numeroj de ET.

La prezo baldaŭ alfiĝos

Eldonejo de „Esperanto Triumfonta“  
Horrem bei Köln, Germ.

### Lustroj el Kristal-vitro

en ĉiuj stiloj kaj grandoj. elektraj aŭ gasa lumigado, fabrikataj laŭ propraj kaj indikataj skizoj.

### Ernst L. Hettich Nachf. Freiburg i. Br.

Germ., Rheinstr. 60.  
Eksporto al ĉiuj landoj.  
Kapablaj reprezentantoj serĉataj.



Se vi serĉas livejojn por ĉiuspecaj komercetoj kaj industriaĵoj aŭ se vi deziras akcepti la reprezentadon de eksportkapablaj firmoj, turnu vin en via propra intereso al la

KOMERCISTA ESPERANTO GRUPO  
FREIBURG I. BR. (GERM)  
KATHARINENSTR. 14

kiu havas bonajn rilatojn al germanaj industriaj kaj komercaj rondoj. — Perado senkosta. — Al demando aldonu resp.-kup.

## Art-Amikoj,

Artajo-, Bildo- kaj Libro-Vendistoj,

kiuj havas intereson por belegaj akvaretoj, oleopentraĵoj ktp. de eminentaj kaj konataj pentristoj aŭstria, turnu sin al

Sepp Osterer, Graz, Aŭstrio, Gleisdorfergasse 5.  
Malaltaj prezoj.

Firenze, Italio, capit. Michele Liverani, Via S. Gallo 27, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr., naciajn ilustr. gazetojn, ĉiuspecajn fotografaĵojn.

Mi deziras korespondi kun samideanoj de ĉiuj landoj por ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Litovio Ŝiauliai, Kriminala skyrius, f-ino Olga Bredulis.

Poŝtmark-kolektantoj atentu! Mi serĉas ĉiututage interrilatojn kun la tuta mondo. Mi ŝanĝas kaj vendas. Mi posedas grandan aron da belaj aŭstriaj poŝtmarkoj. Kontraŭ referencoj mi forsendas belajn elektaĵojn de aŭstria poŝtmarkoj, por aĉeto aŭ vendado. — Josef Kolhofer, Wien 15/4, Zehnerergasse 57.

Deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun samideanoj de ĉiuj landoj: Johano Wakonigg, Köflach, Stirio, Aŭstrio.

S-o Aicher, Wien 4, Lambrechtg. 10, Aŭstrio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, gazetojn kun ĉiuj landoj.

S-o Max Michalski, Mostowa 5 a, il., Poznan, Polujo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj (bfl.), precipe pri teatro, muziko kaj diversaj.

S-o J. B. C. de Koster, 98 Dalton Str., Den Haag, Nederlando, deziras ŝanĝi sport-fotografaĵojn, naciajn kostumojn, poŝtkartojn aŭ poŝtmarkojn.

Poŝtmark-kolektantoj! Interesaj kaj maloftaj poŝtmarkoj de Litovio, Latvio, Rusujo, Estonio, Ĉeĥoslovakio, Rumanio, Belgio, Hungario, Ameriko ktp., ĉ. 2000, estas vendataj de s-o S. Šickus del B. J., Vidžskiai, Ukmergė apskritis, Litovio.

Kvar anglaj samideanoj deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kun la tuta mondo:  
F-ino S. S. Kilgour, 126 Mortimer Road, London N. W. 10.  
S-o T. Glover, 6 Vancouver Road, London S. E. 6.  
S-o L. A. Martin, 4 Charlton Lane, London S. E. 7.  
S-o R. E. Hoskins, 38 Peacock Street, London S. E. 17.

S-o Max Hubl, Salzburg, Aŭstrio, Auerspergstr. 54, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj.

S-o Karlo Steidle, Kornwestheim bei Stuttgart, Industriestrasse 28, Württemberg, Germ., kiu sendas al mi 1 nord. kronon, 1 sviz. frankon, 2 franc. aŭ belg. fr. aŭ samvaloron, al tiu mi sendos 150 malsamajn germanajn poŝtmarkojn.

S-o Fritz Knoll, Plauen i. V., Germ., Gartenstr. 10, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. (bfl.)

Du amikoj deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kun tutmondaj samideanoj, precipe kun porcelanpentristoj. — Rud. Friese, Waldenburg, Auenstrasse 35, Schlesien, Germ. — Emil Reimer, Neu-Weisstein, Kreis Waldenburg, Bergstr. 7, Schlesien, Germ.